

V - 19479 / 30

(1961)

N 1-5, 7-12

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



1

SOFIA - JANUARO 1961

## E N H A V O

	Pago
* * * — Sub la venka standardo de Marksismo-Leninismo	1
C. Murgin — „Bulgara Esperantisto“ jubileas . . . . .	2
* * * — Simeon Petkov . . . . .	5
* * * — Ĥristo Botev . . . . .	6
Ĥr. Botev — Ridinda ploro . . . . .	7
Batalo . . . . .	8
Mia preĝo . . . . .	9
Tr. Petkova — Mi korespondas . . . . .	10

### TRA LA MOVADO

a) Enlanda . . . . .	11
b) Eksterlanda . . . . .	14

### NI RECENZAS

Pro unu bovino . . . . .	14
Organiza konkurso	15

*ekster-*

*Aĥonkotizo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por lando — 16 levoj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro. Unuopa ekzemplero — 1.40 lv.*

*Reklamtarifo: 5 levoj por cm<sup>2</sup>; korespondanoncoj: 0.5 levo por tiu vorto. Eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage Ekstera kovrilpaĝo — 1000 lv.*

### LANDAJ REPRESENTANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

**ALBANIO:** Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane

**ITALIO:** Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

**KOREO:** Korca Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

**NEDERLANDO:** Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.

**RUMANIO:** Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5

**SOVETUNIO:** J. Kudrjavickij, PK 1255, Moskva K—9.

**SVEDIO:** Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

Frontpaĝa foto: Gelernanta Esperanta Kurso en Tolbuĥin



## **SUB LA VENKA STANDARDO DE MARKSISMO-LENINISMO**

*La bulgaraj esperantistoj arde aprobas la Deklaracion de la kunsido de reprezentantoj de la komunistaj kaj laboristaj partioj, okazinta pasintjare dum novembro en Moskvo. La kunsidintoj sin turnis per Alvoko al la popoloj en ĉiuj landoj.*

*En tiuj ĉi dokumentoj estas klare montritaj la ĉefaj problemoj de nia epoko, kies plej grava karaktera trajto estas la transiro de kapitalismo al socialismo. Kiel evidentiĝas la socialisma mondsistemo estas grava potenco, kiu antaŭenmovas la progreson en la socio. Vane la imperiistoj penas obstakli. Malgraŭ iliaj konspiroj kontraŭ la demokratio kaj naciliberigaj movadoj, ili neniam sukcesos bari la vojon al la venko de socialismo en la tutmondo.*

*Ĉiuj popoloj en Eŭropo, Azio, Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio aprobas kaj, subtenas la pacpolitikon de Sovetunio kaj la ceteraj socialismaj landoj, kiuj proponas pacan konekzistadon, neniigon de la atomaj bomboj, plenan senarmigon kaj forigon de la kolonisistemo.*

*La Deklaracio montras al ĉiuj la vojon al la mondpaco. Ĝi konvinkas ke la pacama homaro povas bridi la militn stigantojn kaj eviti la militon. Tial la komunistaj partioj alvokas ĉiujn demokratojn kaj progresemulojn unuiĝi en la batalo kontraŭ la imperiismaj preparantoj de nova milito. Oni ne devas atendi ĝis ekpluvos raketoj kun H-bomboj — tuj devas komenci la amasa batalo kontraŭ la maniuloj, kiujn naskis la armilfabrikantoj.*

*La Deklaracio kaj la Alvoko atentigas, ke estas necesa konstanta agitado kontraŭ diversaj reakciaj burĝaj „teorioj“, kiuj pravigas la militpreparon. En la kapitalismaj landoj oni fanfaronas pri ia „popola“ kapitalismo, ĉie laŭdas la „civilizacian“ rolon de la imperiistoj en la kolonioj, la kreon de militunuiĝoj, kies tasko estas fulmrapide ataki Sovetlandon, Ĉinion kaj la ceterajn socialismajn ŝtatojn.*

*La kunsido en Moskvo ankoraŭ foje pruvis, ke la komunistoj de la tuta mondo estas forte unuigitaj ĉirkaŭ la Sovetrespublikara Komunista Partio, ĉar ĝi estas kreita de Lenin kaj posedas sufiĉan sperton en la konstruado de ko-*

*munisma mastrumo kaj kulturo. La socialisma tendaro posedas grandan povon kaj ne timas la minacantajn generalojn kaj diplomatojn en la kapitalismaj landoj, sed ĝi ne deziras novan militon, kiu kaŭzos la morton de centoj da milionoj da laborhomoj. Tial la komunistaj partioj unuanime etendas manon al ĉiuj pacamantoj kaj proponas unuec-fronton kontraŭ militpreparantoj, kies ĉefaj gvidantoj estas la generaloj kaj ekspluatistoj en la Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko.*

*La unueco donas fortojn, tial la bulgaraj geesperantistoj tutanime aliĝas al la Deklaracio. Ni varme dankas al la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio kaj ĝia ĉefsekretario Todor Jivkov, kiu partoprenis la kunsidon en Moskvo kaj kune kun la ceteraj delegitoj de BKP helpis la ellaboron de la signifoplenaj dokumentoj.*

*Kiel fervoraj pachtalantoj la bulgaraj geesperantistoj plene aprobas la Deklaracion kaj la Alvokon. Nia nepra devo estas koni ĝin al ĉiuj organizitaj kaj neorganizitaj esperantistoj. Dum niaj kunvenoj kaj ekskursoj ni devas paroli pri ĝia signifo. Nia tuta agado devas esti trapenetrita de la Deklaracio kaj la Alvoko. Ni devas agi ankoraŭ pli fervore por la feliĉigo de nia popolo. Tiucele la bulgaraj geesperantistoj helpas per ĉiuj fortoj la konstruadon de socialismo, partoprenante en la realigo de la nova kvinjarplano.*

*Nia karmemora majstro L. Zamenhof deklaris antaŭ la kongreso en Kembriĝo en 1907 jaro: „Ĉio, kio servas al la tratiĝado de la gentoj kaj al rompado de la malamikaj muroj inter la popoloj, apartenas al la verdstandardo“. La Deklaracio de komunistaj partioj helpas por firmigi la pacon. Pro tio ni unuanime subtenas ĝin kaj daŭrigos senmaskigi la militpreparantojn, kiujn iam d-ro Zamenhof nomis „nigraj semantoj de malpaco“.*

*Do al obstina laboro por plenumo de la konstruprogramo de nia lando, por disfloro de la nova vivo, por la triumfo de la komunismo.*

## „BULGARA ESPERANTISTO“ JUBILEAS

Per ĉi tiu numero „Bulgara Esperantisto“ eniras sian 30-an jarkolekton. Foliumante la malnovajn jarkolektojn oni facile konstatas, ke la progresemaĵoj publikaj okupas konsiderindan lokon en la paĝoj de la gazeto. Oni trovas en abundo originalajn artikolojn pri kulturaj, pedagogiaj, historiaj, kaj organizaj temoj. En tiu rilato kontribuis T. Samodumov, T. Ĥristovski, Iv. Keremidĉiev, Iv. Sarafov k. a. La verkemaj kamaradoj sin ĵetis kun ardo en la literaturan agadon. Ili verkis verkojn de Esperanto-poezio kaj multajn rakontojn. Inter la plej vervaj poetoj elsta-

ris M. Ljubin (Asen Grigorov), Zefiro (Violin Oljanov), Rimna (Marin Bălgarenski), Miti (Dimităr Zlatarski), Georgi Dikovski k. a. Multaj kamaradoj sin fordonis al nobla tradukado de bulgaraj poetoj kaj beletristoj en Esperanton (Iv. Dobrev, At. Lakov, D. Sasonov, Ĥr. Gorov, k. a.). Kaj tiu verva bolado en la literatura kampo estis lerte subigita al la postuloj de la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kontraŭ la fundamentoj de la kapitalismo mem.

Kompreneble la historio de la organo de nia Esperanto-movado estas longa, interesa kaj instrua precipe por

la pli junaj generacioj. Ĝi atestas pri la granda interesigo de nia popolo ne nur al la ĝeneralaj kulturaj problemoj, sed ankaŭ al tre specifaj problemoj, kia estas la problemo pri apliko de la artefarita internacia lingvo. Nur tiel oni povas klarigi, ke tuj post la unua publika elpaŝo de Esperanto (1887) ĝi enpenetris Bulgarion en la fino de la sama jaro, ĉar jam en 1888 la volapükista grupo en Târnovo organizite konvertiĝis al Esperanto. Samtempe, kune kun la unua internacia Esperanto-gazeto „Esperantisto“ de L. L. Zamenhof en Bulgario aperis la unua landa Esperanto-gazeto „Mondlingvisto“ (1889). La progresemaĵoj de nia popolo, kiuj estis senkompate ekspluatataj tiutempe de fremdlandaj monopoloj havis pli frue ol la Okcidentaj landoj sian Esperanto-gazeton. Kaj nun tio estas unu el la naciaj fieroj de nia laborema kaj pacstrebanta popolo, kiu liberiginte antaŭ 16 jaroj de la kapitalismaj katenoj larĝpaŝe marŝas sur la vojo al socialismo.

Poste sekvis aro da Esperanto-gazetoj eldonitaj en nia lando: „La Espero“ (1890—1891), „Rondiranto“ (1902—1914), „Trumpetisto“ (1904), „Unua paŝo“ (1905—1907), „Lumo“ (1906—1910) kaj „Esperanto“—ĵurnalo (1906—1907). En la komenco de 1907 aperis la unuaj tri numeroj de nova gazeto „Bulgara Esperantisto“. En 1912 oni decidis reeldoni ĝin sub la sama nomo, sed la sekvintaj niĝoj (1912—1913, 1913, 1915—1918) malebligis tion.

En 1919 „Bulgara Esperantisto“ reaperis. La enkonduko de Esperanto kiel nedeviga lernobjekto en la realajn gimnaziojn (1921) fare de la registaro de ministro-prezidanto Al. Stambolijski puŝis antaŭen la evoluon de Esperantomovado. Kreskis la nombro de la abonantaro kaj ĝi stabiligis finance. La kunlaboro inter la proletaj kaj etbienulaj esperantistoj kontribuis por larĝa enpenetro de Esperanto inter la laboristojn, vi'aganojn kaj progreseman inteligentularon. Tiu kunlaboro havis da-

ŭran efikon ankaŭ post la renverso de la demokrateca reĝimo de la Agrara Partio kaj la starigo de faŝisma diktatoreco en Bulgario (1923).

Dum la faŝisma periodo en nia lando du fojojn en la gazeto aperis artikoloj (1927 kaj 1939) de „neŭtralaj“ gvidantoj per kiuj ili proklamis „krizon“ en la Asocio kaj deklaris militon al la „maldekstraj“, „fremdaj“ kaj „detruaj elementoj“. La elstaraj komunistaj esperantistoj estis forigitaj el la Asocio, sed ilia loko estis okupita de aliaj k-ĉoj, kiuj daŭrigis influi ideojn al la Esperanto-movado. Kompreneble la forigoj de progresemaĵoj esperantistoj el la vicoj de la Asocio estis pezaj batoj sur la Esperantomovado mem. Estas evidente, ke la „neŭtralaj“ esperantistaj gvidantoj deziris pruvi al la faŝismaj instancoj sian kontraŭkomunisman starpunkton, sed tio ne helpis al ili plifirmigi sian pozicion inter la esperantistaro. Ili mem senrevene sin kompromitis kaj izoligis precipe post la dua „purigo“ (1939). Tute ne estas hazarda la sciigo en „Bulgara Esperantisto“, ke la 27-a Esperanto-Kongreso en julio 1940 (en urbo Loveĉ) estis gvidata de nia k-ĉo Iv. Keremiĉiev. Li ne estis membro de la tiam Centra Komitato, sed estis komisiita de iuj CK-anoj raporti pri la agado kaj pri la financa stato de la Asocio de aŭgusto 1939 ĝis julio 1940.

La dummiliaj kajeroj de „Bulgara Esperantisto“ bone dokumentas pri la agado de la progresemaĵoj. La ekstera aspekto de la gazeto ŝanĝiĝis. Malaperis la banalaj ĉefartikoloj. La frunta paĝo de la kajeroj estis dediĉita al portretoj de eminentaj bulgaroj (Iv. Vazov-verkisto, Dobri Ĥristov — komponisto, G. Ĝunĉev — univ. profesoro kaj esperantisto) al reproduktaĵoj de bulgaraj pentraĵoj kaj fotoj el la naturo. La ĉefartikoloj, kaŝitaj en dua (kaj tria) paĝoj, kaptis la korojn de la legantoj. Post la invado de la germano-faŝistaj armeoj en Sovetunio ne plu estis anoncata la nomo de la respondeca redaktoro. En sia re-

dakta posteno li estis malavare helpata de la fervora komunista Esperanto — grupo gvidata de k-do Iv. Keremidčiev, kiu kontaktis kun ĉiuj progresemaj kunlaborantoj, kun societoj en la provinco kaj kun k-doĵ en la malliberejoj.

En la numero de novembro-decembro 1941 aperis la verva poemo-batalo lvoko „Mia kanto“ de k-do As. Grigorov, kiu tiutempe estis malliberigita. Kaj nun mi ne povas rezisti al la alloga tento reciti kelkajn strofojn de ĝi:

Nun — la korsentimentoj formortas velkante en la tagoj de sanga batal'.  
Mi galopas antaŭen kaj vokas flamkante kaj alarmas per fajra signal'.

Mi forgesas prikanti la mildajn animojn, kaj sopiri kaj plori per larm'...  
Mia kanto funebras la karajn viktimojn sed samtempe tamburas: alarm'!

Ho, ni estas milmiloj kaj niaj armiloj ne nur estas el ŝtalo kaj fer' — ni batalas per glavoj ankoraŭ pli brilaj: per justeco, per lumo kaj ver'!

Kaj en tiu ĉi tempo unike majesta mia kant' estas kupra fanfar', kiu vekas kaj vokas per voĉo tempesta: Al batalo, vi granda homar'!

Sofio, novembro 1941.

M. L.

Venis la plej nigraj tagoj por nia movado kaj ĝia organo. La faŝismo rabis kaj rabiis, mortigis kaj detruis. La „neŭtralaj“ esperantistoj abdikis de siaj verdpostenoj. En la gazetaro bulgarlingva aperis malice kalumniaj artikoloj (1943). Venadis novaj kaj novaj funebraj sciigoj pri pereoj de geesperantistoj, jen pendigitaj en la malliberejoj, jen mortpafitaj dum demonstraĵoj aŭ en bataloj kun faŝistaj trupoj. En tiuj malfacilaj tagoj kun helpo de hungaraj k-doĵ ni sukcesis aperigi en Budapeŝto la anstataŭanton de nia organo — „Revuo-Bulteno“. En 1943 aperis de ĝi 3 numeroj (junia, septembra kaj decembra).

Post perribela renverso de la faŝista diktatoreco je la 9-a de septembro 1944 nia popolo liberigis. En novembro 1944 aperis en Ruse la Kvara kaj lasta numero de „Revuo-Bulteno“. La rolon de asocia organo ludis la mondfamiginta gazeto „Internacia Kulturo“ (1945—1950). Samtempe aperis precipe

bulgarlingve „Bulgara Esperantisto“ (1946—1947). Sekvis nelonga paŭzo de stagna periodo dum kiu nia Asocio finfine trovis sian daŭran lokon en la kulturaj manifestigoj de nia klera popolo. En 1955 nia organo reaperis stencilita sub la modesta nomo „Bulteno“. En 1957 ĝi estis rebaptita en „Bulgara Esperantisto“. Ek de 1958 ĝi aperas presita kaj en la lastaj du jaroj ĝi konsiderinde plibonigis, ne nur laŭ la ekstera aspekto, sed ankaŭ laŭ la enhavo.

La ĝisnuna vojo de „Bulgara Esperantisto“ estas vojo de venkinto. Neniam pli frue ĝi havis pli brilan perspektivon. Nia movado jam havas la favorajn kondiĉojn pri kiuj ni batalis kaj donis multajn kaj tre karajn viktimojn. La sekreto de niaj sukcesoj estas kaŝita en la firmaj ligoj de nia Asocio kaj movado kun la batalo de nia popolo por paco kaj socialismo.

Canko MURGIN



## SIMEON N. PETKOV — LA UNUA REDAKTORO DE „BULGARA ESPERANTISTO“

Simeon Nikolov Petkov naskiĝis en urbo Silistra la 13-an de junio 1883. Li studis juron en la universitatoj de Sofio, Grenoblo, Ĝenevo, Zagrebo kaj Munĥeno. Laŭ profesio li estas advokato kaj juĝisto en Sofio.

En 1902 kune kun siaj amikoj-junuloj li fondas literatur-sciencan societeton „Pârva kraĉka“ („Unua paŝo“), kiu havas kiel devizon „konscio, memkleriĝo kaj disvolviĝo.“ Elektita kiel gvidanto de la societo li komencas eldoni ĝian organon sub titolo „Pârva kraĉka“, kiu aperis monate, en la komenco hektografita, kaj poste litografita.

En la gazeteton oni enkondukis esperantan fakon, kie oni donis la tutan gramatikon por la fundamenta lernado de Esperanto.

Samtempe en Sofio oni fondas la klubon de la esperantistoj, kies prezidanto estas N. Kovaĉev, tiam juĝeja oficisto. En tiu ĉi klubo vigle laboris multaj el la membroj de „Pârva kraĉka“ — P. Spasov, G. Nikolov, G. Zografski, S. Petkov k. a. Inter la aliaj membroj de tiu ĉi klubo estas ankoraŭ Petâr Jordanov, tiam studento, P. Popov, gimnazia instruisto, G. Atanasov, d-ro M. Bogdanov-Diodono k. a.

En la komenco de 1906 la societo „Pârva kraĉka“ komencis eldoni la gazeteton nur en Esperanto. Ĉefredaktoro estis Simeon Petkov kaj kunredaktoroj: G. Nikolov, P. Spasov, Ĥr. Rjahovski, G. Zografski. Ĝi estis eldonata en 150 ekzempleroj kaj dissendata interŝange al la redakcioj de preskaŭ ĉiuj fremdaj Esperanto — gazetoj.


La 7-an de oktobro 1906 oni kunvokis en Sofio kongreson de la bulgaraj esperantistoj, kiu decidis, ke ĉiuj esperantistoj de la tuta lando unuigu

en unu esperantista organizaĵo kaj eldonu sian organon sub titolo „Bulgara Esperantisto“. En tiu ĉi kongreso partoprenas ankaŭ la membroj de la societo „Pârva kraĉka“. Post la supraj decidoj de tiu ĉi kongreso en 1907 ekaperis „Bulgara Esperantisto“ anstataŭ „Unua Paŝo“.

En 1907 la membroj de „Pârva kraĉka“, inter kiuj G. Karastojanov, G. Nikolov, P. Spasov, S. Petkov k. a. partoprenas en la kongreso de la esperantistoj, kunvokita en Târnovo. Konforme al ĝiaj decidoj organo de la bulgaraj esperantistoj fariĝis la gazeto „Lumo“ — eldonita en Târnovo.

En 1912 S. Petkov estas elektita kiel prezidanto de Bulgara Esperantista Societo kaj restas sur tiu posteno ĝis 1920.

Simeon Petkov estas lerta propagandanto. Li estas aŭtoro de bonaj artikoloj pri Esperanto. En gazeto „Bulgara Esperantisto“ (I serio), jaro I, n-ro 1, januaro kaj februaro 1907, estas publikigita lia artikolo „La problemo pri Internacia lingvo kaj ĝia solvo per Esperanto“. Kiel aktiva funkciulo en la Asocio de la Bulgaraj Advokatoj li kunlaboris kun la progresemaj ad-



vokatoj en ilia batalo kontraŭ la faŝismo. Nun Simeon Petkov estas pensiulo, loĝas en Sofio kaj daŭre interesiĝas pri la agado de Bulgara Esperantista Asocio.

Nuntempa esperantista generacio dankas al nia malnova Esperanto-pioniro pro lia senlaca agado en la eldonado de „Bulgara Esperantisto“.



**HRIŖTO BOTEV**  
(1849—1876)

Forpasis 112 jaroj de la naskiĝo de la plej granda bulgara poeto Hristo Botev. La tuta literatura verkaro de Botev inkluzive de liaj vervaj poemoj estas intime ligita kun la revolucia agado. Daŭrigante la plej belan tradicion de la popola liriko Botev sin apogis je la sperto de la rusa poezia realismo (Puŝkin, Lermontov, Nekrasov) kaj dediĉis siajn poemojn al emociplenaj temoj de la naci-liberiga batalo. Li kreis siajn ĉefverkojn de la bulgara kaj tutmonda liriko, kiel la nefinita poemo „Hajdutoj“ (1871), „Batalo“ (1871), „Ĥagi Dimitro“ (1873), „Pendigo de Vasil Levski“ (1874) k. a.

En sia politika kaj literatura agado Botev reliefigas kiel revolucia demokrato, kuraĝa, fiera, sen katenoj, ĉe kiu paroloj kaj agoj kuniĝas en ne-

disigeblan tuton. Lia heroa pereco en batalo kontraŭ la turkfeodaj subpremanoj (1876) elokvente montras tion.

La poezio de Botev estas la kulmino, la plej supera atingiĝo en la bulgara literaturo. La vivo kaj la literatura verkaro de Hristo Botev estis kaj estas imitinda ekzemplo por ĉiuj bulgaraj revoluciuloj kaj progresemaj poetoj de post lia pereco ĝis nun.

Jen kion skribas pri Hristo Botev la amata instruisto kaj gvidanto de nia popolo Georgi Dimitrov: „En la nuntempa batalo por demokratio, por popola respubliko kaj nacia sendependeco, por progreso kaj levigo de nia nacio Hristo Botev estas standardo, kiu pli kaj pli alte flirtas super la nova demokratia Bulgario“.



## RIDINDA PLORO\*

Aristo Botev

Ploru pri Parizo, la ĉefurbo de la di-  
boĉo, de la civilizacio, la lernejo de la  
spionado kaj sklaveco; ploru, filantro-  
poj, pri la palacoj de la teruraj vam-  
piroj, de la grandaj tiranoj — pri la  
monumentoj de la stulteco, de la bar-  
bareco, konstruitaj el la fortranĉitaj  
kapoj de tiom multe da pioniroj, de  
tiom multe da grandaj pensuloj kaj  
poetoj, el la ĉirkaŭmanĝitaj ostoj de  
tiom multe da martiroj de la ĉiutaga  
pano — ploru! La frenezulojn neniu  
povas konsoli, la furiozulojn neniu po-  
vas kvietigi!

Damnu la komunistojn, ĉar ili detrui-  
s vian ĉefurbon kaj mortis kun la  
rabistaj laŭ vi vortoj: libero aŭ morto,  
pano aŭ kuglo! Kraĉu sur iliajn kada-  
vroj kaj sur la kadavroj de tiuj vik-  
timoj de la civilizacio, kiujn vi ĉirkaŭ-  
brakis kaj ĉirkaŭbrakas en la person-  
eco de viaj edzinoj, de viaj fratinoj,  
de viaj patrinoj, kaj hodiaŭ vi nomas  
radiaj malĉastulinoj, ĉar ili havis anko-  
raŭ forton por preni la armilon kaj  
savi sin el la bordelo de la diboĉo!  
Jetu koton kaj ŝtonojn sur la tom-  
bon de Dombrovski, ĉar li ne fariĝis  
servisto de iu kronita kapo, sed pio-

niro de granda ideo, de alta celo kaj  
per brusto fortika kontraŭstaris la per-  
fidulojn de Francio kaj la kulpulojn pri  
tiom multe da malfeliĉoj en la mo-  
ndo. . .

La tuta mondo ploris pri Parizo, la  
tuta mondo damnis la komunistojn, kaj  
nia kompatinda gazetaro ankaŭ ne  
restis malantaŭe, ankaŭ ĝi ekploris pri  
la senanima kaj malbenis la prudenton.  
Ridinda ploro! Kvazaŭ de Nimvrodo  
ĝis Napoleono, de Kambizo ĝis Vilhe-  
lmo la milito ne prezentas ĉiam la  
samajn spektaklojn, ĉiam la samajn cel-  
ojn kun la samaj rimedoj. Kvazaŭ Napo-  
leono, en la nomo de la civilizacio,  
kaj Vilhelmo, en la nomo de la dia  
fato, ne faris pli da malbono, pli da  
barbaraĵoj en la 19 a jarcento, ol ek-  
zemple Aleksandro la Macedona per  
siaj militiroj antaŭ tiom multe da jar-  
centoj. Sed tie estas barbarecoj, ĉi tie  
estas riproĉoj kaj malbenoj, kie la sklav-  
o la homo, pro tio ke oni ne aŭdas liajn  
parolojn, lian prudenton, fariĝas ekst-  
rema kaj batalas por vivo kaj morto,  
kiom liaj rimedoj permesas, kiuj estas  
malnoblaj, ĉar estas malgrandaj kaj  
estas malgrandaj nur tial, ĉar la rega-

\*La artikolo „Ridinda ploro“ aperis la 15-an  
de junio 1871 okaze de la sinteno de la tiamaj  
bulgaraj ĵurnalistoj al la eventoj en  
Parizo dum la printempo 1871—la ribelo de la  
pariza proletaro kaj la fonda de la Pariza  
Komuno.

Dombrovski estas pola revoluciulo, kiu  
partoprenis en la starigo de la Pariza Komuno.

La Pariza Komuno havis tre revolucian  
efikon en ĉiuj landoj. Aristotelo Botev formis  
kune kun Veliĉko Popov komunistajn oficejo-  
jn kaj verkis statutojn por ili sub la formo de  
„Simbolo de la Kredo“. Krom tio li sendis  
ankaŭ telegramon al la prezidanto de la Pariza  
Komuno.

Laŭ sia senrezerva sindono kaj pasieco, la  
defendo, kiun Botev faris al la Pariza Komuno

estas komparebla kun la defendo, farita al ĝi  
de Marks. Tial „Ridinda ploro“ estas fenome-  
no malofta en la mond-literaturo. En ĝi nia  
poeto malkaŝis kaj sian mondrigardon, kaj  
sian temperamenton, kaj sian tutan fajrole-  
nan naturon.

Nimvrodo estas fondinto de la Babilona  
regno.

Kambizo, pli maljuna filo de la persa reĝo  
Kiro. Li surtroniĝis 530 antaŭ nia epoko. Li  
konkeris Egipton kaj distingigis per sia kru-  
eleco.

Lojola Ignacio (1496—1556), hispano, fonda-  
nto de la jezuita ordeno, kiu lamiĝis kiel  
fanatika defendanto de la katolika eklezio.

(Laŭ akademiano Miĥail Dimitrov)

ntoj ilin uzurpis. Tiam oni nomas la homon rabisto, diboĉulo, malnoblulo kaj barbaro! Tiaj estis ankaŭ la komunistoj.

La kristanismo havis siajn martirojn, ĝis kiam ĝi povis nomi la sklavon „filo de dio, filo de homo“; ilin havas ankaŭ la revolucio, por fari la vagabondon civitano; havas kaj havos ankaŭ la socialismo, kiu „volas fari la homon pli ol filo de dio kaj civitano — ne idealo, sed vera homo, kaj ke de li la civito dependu, kaj ne li de la civito“. La kristanismo, la revolucio kaj la socialismo — la monarkio, la konstitucio kaj la respubliko — ili estas faktoj kaj epokoj historiaj, kiujn neos nur tiu cerbo, kiu ne rekonas la progreson de la homaro.

La lernejo kaj nur la lernejo, diris la maljunulino Macedonio (bulgara ĵurnalo „Macedonio“, redaktita en Konstantinoplo, 1871) — savos Eŭropon

de la sociala revolucio; la lernejo kaj nur la lernejo, ni ripetas, ĝin preparos por tiu ĉi revolucio; sed ne la lernejo de Zlatoust kaj Lojola, de Vilhelmo kaj Napoleono, sed la lernejo de Furie kaj Prudon, de Kjuvie kaj Njuton kaj la lernejo de la vivo.

La komunistoj estas martiroj, ĉar ne gravas la rimedoj en ilia batalo por libero, sed la ideo pri tiu ĉi batalo. „Ankaŭ la libero havos siajn jezuitojn“ — diras Hajne.

Nia ĵurnalistaro nun bonvolu haltigi siajn larmojn, kiel ilin haltigos ankaŭ la eŭropa — por priplori aliajn ĉefurbojn, aliajn barbarajn kaj suferojn, kiam la sklavo ekkrios al sia reganto: Kiu vi estas, kiu ploras? Ĉu estas viro, virino aŭ hermafrodito — sovaĝa besto aŭ fiŝo?...

„Kaj estos tago — tagunua...“

Tradukis: Iv. SARAFOV

## BATALO

Juneco pasas ĉagrensufere,  
en vejnoj sango bolas kolere,  
la menso vidi vane ja penas,  
ĉu bono aŭ malbono alvenas. . .  
Pasinto nigra kuŝas en koro,  
ripetas ĝin malica memoro.  
En brusto velkas amo kaj vero,  
forveki homon mortis espero —  
ĉu revekiĝus iu bravulo?  
Bravulon pensas ni frenezulo,  
friponon ĉie oni estimas:  
„Li riĉas“, diri oni kutimas.  
Riĉulo, fratoj, vivajn bruligas  
la orfojn, rabas, enkatennigas,  
kaj ofte staras antaŭ altaro  
por trompi vin per sia preĝaro.  
Kaj tiun hom-premulon inspiris  
la eklezi!, kaj pastroj admiras,  
kaj instruisto filozofias.  
al gazetisto kunharmonias,  
ke *timi Dion* estas komenco  
de la saĝeco. . . Sklava sentenco!  
La safofelaj lupoj ĝin diris —  
sankcii la katenojn deziris,  
subpremi ĉiun senton kaj penson,  
kaj ekkateni homan la menson.  
Tiran' Salomo, diboĉe sprita,  
en paradizon ien sendita  
kun la sentencoj siaj tre stultaj,  
sentencon diris inter la multaj,

kaj vivas ĝi en ĉies animo:  
„Timu de Dio, reĝon estimu!“  
Sankta stultaj! Centjarojn batalas  
kontraŭ ĉi menso kaj konscienco,  
bravuloj multaj falis kaj falas,  
sed kion faris? — Vivon sen senco  
popol' trcnadas — morte suferas  
kviete la premulojn toleras,  
kisdadas de l' fripono la manon  
kaj kredas la trompantan tiranon:  
se batas vin oni — preĝu, silentu  
kaj lupu, se vin mordas, popolo,  
se sangon vian suĉas serpento, —  
preĝadu: Dia volas ĝin volo!  
„Pardonu min pekulon, sinjoro!“  
parolu, preĝu, firme esperu —  
pravulojn trafas Dia kolero. . .  
Tiel mond' iras! Sklavec', malvero  
reĝas sur tiu damnita tero —  
tagnokte de la gento al gento  
eterne pasas ĉi-testamento.  
En tiu regno de la perfido,  
de malĉastado, larmoj, insido, —  
senlima regno de la malbono —  
batalo bolas, iros kun sono  
al sankta fino. . . ĝis al tirani!  
„Panon aŭ kuglon!“ ekkrios jam ni!

1871

Tradukis: Ivan Dobrev



## MIA PREĜO

„Benata estu Dio mia . . .“

Dio mia, justa Dio!  
Ne vi en ĉielo fora,  
sed en mi, ho mia Dio, —  
en l'animo, en la koro . . .

Ne vi, kiun priadoras  
pastroj kaj monaĥoj piaj  
kiun per kandeloj gloras  
ortodoksaj brutoj niaj;

Ne vi, kiu el kot' faris  
la virinon kaj la viron,  
tamen por la hom' preparis  
vivan sklavan kaj martiran;

Ne vi, kiu sanktoleis  
patriarkojn, reĝojn, papojn,  
kaj mizeran vivon kreis  
por malriĉaj miaj fratoj;

Kaj la sklavon igas trompe  
preĝi nur kaj nur toleri,  
kaj nutrados lin ĝistombe  
per ĥimeroj kaj esperoj;

1873

Ne vi Dio de l'trompuloj,  
de l'tiranoj hipokritaĵaj,  
vi idolo de l' stultuloj,  
de la homaj malamikoj!

Sed vi Dio de l'racio,  
defendanto de la sklavo,  
kies tagon la nacioj  
baldaŭ festos kiel savon!

Vi al ĉiu vivan amon  
al liber' inspiru, Dio —  
por ke kontraŭ la tiranoj  
de l'popolo luktu ĉiu.

Fortikigu manon mian,  
por ke ĉe l'ribel' de l'sklavo  
sur la batalkampo, Dio,  
ankaŭ min la morto trafu!

Malvarmiĝu, vi ne lasu  
en fremdlando koron mian,  
kaj ke mia voko pasu  
kvazaŭ en dezerto krio! . . .

Tradukis: Asen GRIGOROV  
Ivan DOBREV

*Nur la prudenta kaj frata unuiĝo  
de la popoloj povas nenigi la suferojn,  
la mizeron kaj la parazitajn de  
la homaro*

Aristo BOTEV

## MI KORESPONDAS

Mi havas pli ol 50 gekorespondantojn el la tuta mondo — USSR, Ĉinio, Hungario, GDR, Francio, Hispanio, Belgio k. a. landoj.

Ĉiutage mi ricevas kaj skribas leterojn.

Miaj gekorespondantoj rakontas al mi pri si mem, pri siaj landoj, pri siaj malfeliĉoj aŭ sukcesoj.

Kion mi skribas al ili? Ĉis kiam mi laboris en la Bulgaraj Laboristaj Sindikatoj mi skribis al ili kiamaniere estas organizitaj la laboristoj en nia lando, pri la partopreno de la laboristoj en la administrado de la entreprenoj. Mi rakontas al ili pri la libertempo de la virinoj kiuj naskas infanojn, pri la ripozejoj organizitaj de la sindikatoj.

Ofte mi skribas al ĉiuj miaj gekorespondantoj leterojn kun unu kaj sama teksto — pri la nova pensia leĝo, pri la plenumo de la kvinjara ekonomia plano, pri la prospero de Esperanto en nia lando k. t. p.

Iufoje mi decidis demandi kion opinias miaj amikoj pri la paco. Ĉu ili partoprenas en la pacbatalo?

Mi skribis al ĉiuj petinte ilin: Ĉu en via lando ekzistas pacbatalanta komitato? Ĉu vi partoprenas en la pacmovado? Kion vi opinias pri la proponoj de Sovetunio pri la senarmigo de la ŝtatoj en la tuta mondo?

Ĉiuj miaj gekorespondantoj respondis al mi, ke ili estas kontraŭ la milito kaj batalas por la paco.

Mia amikino el Montpelie, Francio skribis: „Malbenita estu la milito! La

germanaj faŝistoj mortigis mian edzon. Mi estas vidvino. Mia ununura filino ne rememoras sian paĉjon. Ni, la francaj virinoj hontas pro la milito, kiun kondukas la franca kapitalista registaro kontraŭ Alĝerio“.

Okaze de la 50-jara jubileo de la 8-a de Marto — la Internacia Tago de la Virinoj mi salutis ĉiujn miajn korespondantinojn.

Ramiro Zoran el Hispanio skribis al mi:

„Vi, la bulgaraj virinoj estas feliĉaj, vi povas festi la jubileon. En mia lando regas faŝismo. La virinoj ne estas egalrajtaj al la viroj. Ili ricevas malpli altan salajron ol la viroj, nur pro tio ke ili estas virinoj. Ĉiuj pordoj por ili estas fermitaj krom la pordo de la preĝejo kaj kuirejo.“

Salutante miajn amikojn okaze de la Unua de Majo, mi rakontis al ili pri la granda manifestacio de la tuta bulgara popolo. Mia amiko el Germana Federacia Respubliko skribis al mi:

„Demonstrante je la Unua de Majo sur la stratoj la federacia polico batis nin nur pro tio, ke ni deziras la unuiĝon de nia patrolando, ĉar ni batalas kontraŭ militisma politiko de la registaro.“

Jen, korespondante tiamaniere la leteroj estas tre interesaj por mi kaj miaj eksterlandaj geamikoj.

La ricevitaj de mi leteroj plifortigas nian amikecon, nian internacian solidarecon.

Tr. PETKOVA

---

*BEA kaj la Redakcio ricevis multajn novjarajn gratulojn de Esperanto-Asocioj kaj de apartaj amikoj el eksterlando kaj de niaj asociaj membroj kaj legantoj.*

*ĈK de BEA kaj la Redakcio de BE kore dankas kaj deziras feliĉon kaj prosperon al ĉiuj esperantistoj en ilia laboro kaj batalo por paco en la tuta mondo.*

a) ENLANDA

## NI KONSTRUAS MONTODOMON „ESPERANTO“ EN VITOŜA

La unua konstrua etapo de nia montodomo jam estas finita.

Frue printempe ni devas daŭrigi la laboron por ke la domo estu preta en la unuaj tagoj de la somero. La konstrua komitato povas efektiviĝi tion, se la esperantistaro sufiĉe aktive monhelpos la konstruadon.

Jen la listo de mondonacintoj: Esperanto-societo „Maksim Gorkij“ — 6.000 lv., M. Langov — 400lv., L. Mladenov — 125 lv., N. Nikclov — 125 lv., K. Gicov — 50 lv., C. Murgin — 50 lv., N. Kolev — 25 lv., M. Ajvazova — 25 lv., Ĥ. Karaneŝev — 125 lv., V. Oljanov — 150 lv., D. Doĉev — 50 lv., L. Grozdanov — 50 lv., D. Terzijski — 50 lv., A. Grigorov — 50 lv., E. kaj R. Popova — 45 lv., S. Simecnov — 50 lv., Fratinoj Bokilovski — 30 lv., P. Stanev — 10 lv. (ĉiuj el Sofio), P. Arnaŭdov — 25 lv., Al. Arnaŭdov —

25., N. Angelov — 25 lv., D. Jakimov — 25 lv., (ĉiuj el Pazarĝik). Entute — 7,480 lv.

Nia malnova kaj entuziasma samideano el Pazarĝik Iv. Vasilev kaj lia frato Sotir Vasilev senpage jam ĉizas por nia esperantista domo memortabulon. Ili faras ĝin el fajna itala marmoro. La marmora tabulo kaj la laboro kostos 400 lv. M. Conkovski el Sofio donacis liton. Iv. Petrov el Varna — 30 forkojn kaj 30 kulerojn. La Esperanto-familio Julia kaj Filipino Franĉeski el Italio donacis seruron je kosto 700 it. liroj.

Sofiaj esperantistinoj iniciatis kudradon kaj brodadon de kurtenoj, tablotukoj kaj kusenoj.

Gekamaradoj, helpu la efektivigon de tiu unika en Esperantujo propaganda centro, donacante minimume unu-tagan salajron.

## VIRINA RONDO

**SOFIO.** Antaŭ unu jaro komencis sian modestan laboron la virina rondo ĉe Sofia Esperantista Societo „Maksim Gorkij.“ La esperantistinoj vizitadas regule kaj amase la kunvenojn, tamen ne partoprenas la diskutadon. Ili silente aŭskultas la paroladojn kaj foriras. Por forigi tiun-ĉi malkuraĝecon kaj por altiri la virinojn al pli vigla laboro en la societa vivo la malnovaj esperantistinoj B. Popova, D. Abaĝieva, R. Rajnova, B. Marinova kaj R. Arnaŭdova decidis formi virinan rondon. Poste estis altiritaj en la rondon pli novaj esperantistinoj. Nun la rondo nombras 17 aninoj, kiuj kunvenas ĉiumerkrede je la 19-a horo laŭvice en privataj domoj. Plej ofte ili gastas al s-nino V. Kavrakova,

Virina esp. rondo „Maksim Gorkij“ en Sofio :

La pola samideanino Maria Pernach parolas pri sia lando



kies domo estis proklamita kiel „modela domo“ de la kvartala Patrolandfronta organizajo. En agrabla hejma atmosfero kaj en libera interparolado en Esperanto je variaj temoj la esperantistinoj pasigas du horojn ĉiusemajne. La pli spertaj korektas la erarojn. Je specialaj okazoj, per telefono estas serĉata la helpo de la malnovaj pioniroj kaj spertuloj — ADA, As. Grigorov, As. Simenov k. a.

La esperantistinoj preparas hejman laboron, tradukojn k. t. p. kiuj en la rondo estas kolektive korektataj. La rondeto komencis kolektivon korespondadon kun la virinoj el Târnovo pere de s-nino Krâstinka Denĉeva, kun tiuj de Stara Zagora pere de s-nino Irina Ĉukova k. t. p. Ili skribas ofte leterojn al s-nino M. Saraljeva en Varna k. a.

La svedo Anders Roos, la polino Maria Pernach vizitis la rondon kaj rakontis pri la virina agado en siaj landoj.

### B. Popova

**PAZARĜIK.** La kursgvidantino Rosica Georgieva malfermis kurson de Esperanto por komencantoj en la Drammuzika teatro. La kurso funkcias ĉiudimanche kaj en ĝi partoprenas ok geaktoroj, inter kiuj tre fervoraj estas la reĝisoro — k-do Svetoslav Atanasov kaj la direktoro de la teatro k-do Georgi Todorov.

### R. G.

**KAZANLAK.** La 31-an de oktobro 1960 la membroj de esperantista societo „Roza valo“ organizis solenan vesperfeston pri Estonio. Interesan prelegon pri la geografio, ekonomio, historio kaj kulturo de tiu ĉi frata socialisma lando faris k-do Marko Kolev.

K-do Iv. Zahariev raportis pri sia vigla korespondado kun estonaj samideanoj. Estis deklaritaj estonaj versaĵoj en Esperanto, estona, rusa kaj bulgara lingvoj. Ne mankis ankaŭ estonaj humoraĵoj kaj ekspozicio pri Estonio. Fine oni aprobis saluttelegramon al la samideanoj el Tallinn okaze de la 43-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio.

Granda surprizo provokis la anonco, ke estonaj gesamideanoj estas sendintaj Esperanto-librojn por vendado kaj per kies monsumo ni aĉetu markobrikojn por nia Esperanto-Domo en Soflo.

En Kazanlâk nun funkcias jenaj Esperanto-kursoj:

E-kurso por infanoj en Infanpionira domo. Partoprenas 13 geinfanoj. Kursgvidanto P. Marĝiev.

E-kurso por infanpioniroj en E-klubejo. Partoprenas 16 gekursanoj. Kursgvidanto — Iv. Zahariev.

E-kurso en la progimnazio. Partoprenas 36 gelernantoj. Kursgvidanto — Iv. Zahariev.

Ĉiulunde okazas parolanta rondo. Gvidas ĝin M. Manev.

Ĉiudimanche je la 10h. okazas parolanta rondo por gejunuloj. Gvidanto — A. Pânĉev.

La 23-an de oktobro 1960 30 gejunuloj el urbo Kazanlâk, fondis esperantistan taĉmenton, kiu ricevis la nomon de la heroe pereinta dum la hispana popolrevolucio esperantisto Petâr Dimov Jonkov.

La celoj de la taĉmento estas: propagandi, batali por paco per Esperanto, informi siajn fremdlandajn geamikojn pri la Esperanto-movado en nia lando kaj pri la ekonomiaj, kulturaj k. a. sukcesoj de nia lando, organizi ekskursojn, renkontojn k. s.

Estis elektita sepmembra estraro kun prezidanto Velko Filipov. La 6-an de novembro la taĉmento organizis sian unuan ekskurson al la heroa vilaĝo Mâglij por renkontiĝi kun la tieaj gesamideanoj.

### A. Pânĉev

**NOVA ZAGORA.** Antaŭ du semajnoj en nia urbo okazis la unua leciono de nia novkreita kurso en la gimnazio, sub la gvidado de k-do Genov. La kurson vizitas dudek kvin lernantoj. Aparte en la kulturdomo estas malfermita kurso por geurbanoj. La studado de la lingvo iras sukcese. Dank' al la granda agitado en la urbo, fare de la Esperantista Societo „Ed. Privat“, la nombro de la partoprenantoj pligrandiĝas. Inter la esperantistoj komenciĝis kampanjo por varbado de abonantoj por la gazetoj „Bulgara Esperantisto“ kaj „Paco“.

### D. Papazov

**KOLAROVGRAD.** Post la 34-a kongreso de BEA, la estraro de la loka societo „Vekiĝo“ sukcesis organizi E-kursojn en apartaj entreprenoj kaj en la gimnazioj. La laboristoj el du fabrikoj — nome el la Maŝinkonstrua uzino kaj emajla fabriko „Pobeda“ — ekdeziris lerni Esperanton.

En la gimnazio „Liljana Dimitrova“ la kursgvidanto Rajna Kasabova instruas al 30 gelernantoj-komencantoj kaj al 11 lernantinoj — progresintoj.

En la gimnazio „Vela Piskova“ la kursgvidanto N. Rajĉeva instruas al 20 lernantinoj. Al ŝi treege helpas k-ino Venkova — instruistino pri matematiko. En la maŝinkonstrua uzino la kursoj komencantoj estas 15 kaj kursgvidanto estas k-do I. Andreev kiu faris ekzamenon dum la kongreso en Târnovo.

En la fabriko „Pobeda“ funkcias kurso kun 15 partoprenantoj — komencantoj sub la gvidado de k-do G. Marov. La sama k-do gvidas kurson ankaŭ en la Distrikta Komerca Entrepreno.

Daŭrigas sian laboron ankaŭ la kurso de k-do A. Ŝaranski en la Instituto de la Asekuro.

La kurso por civitanoj estas malfermita kune kun la kursoj por lernado de fremdaj lingvoj — rusa, franca, angla kaj germana.

Eksonis la belsona Esperanto precipe en la medioj de la laboristoj, teknikistoj k. t. p.

\*At. Bojaĝiev

**RUSE.** La 18-an de novembro 1960 dum la regula semajna kunveno la societanoj de „Libero” estis informitaj pri la alveno el Sofio de la asocia sekretario — k-do Violin Oljanov. Nia estimata sekretario estis renkontita ĉe la stacidomo de gvidantoj kaj aktivuloj de Esperanto-movado en nia urbo. Ili kune alvenis en la klubon ĝuste kiam la novaj fervojistaj esperantistoj elektis la estraron de la nova, la tria Esperanto-societo en Ruse, kiu estis baptita per la nomo „Ponto de l' Amikeco”. Ĝi unuigas esperantistojn de la fervojo kaj de la lokomotiv-vagona uzino „Vasil Kolarov”.

Post tiu ĉi ceremonio komenciĝis kunsido de la sekretario V. Oljanov kun la estraranoj de la tri societoj dum kiu ili klarigis la plej gravan taskon por la momento — la abonigo al „Bulgara Esperantisto”. Oni aprobis ke ĉiu membro fariĝu abonanto de la asocia organo kaj eĉ abonigi siajn allandajn amikojn. Por partopreni la komunan verpermanĝon la kunsidantoj ĉesis sian laboron ĝis la venonta tago kaj grupe direktis sin al la restoracio, kie la junulara grupo engaĝis lokojn. La ĉeesto de nia asocia sekretario plialtigis la intereson kaj la ĝojon de la partoprenantoj. La ebleco paroli kaj diskuti pri diversaj demandoj kaj temoj interesantaj la reprezentanton de CK kaj la esperantistojn en Ruse estis grava kaj utila afero, kiu nur povas kontribui al pluaj sukcesoj de nia movado. La esperantistoj en Ruse restis tre kontentaj pro la vizito de la

asocia sekretario, kio estas taksata kiel granda helpo kaj honoro al nia agado.

**B. Kavalĝiev**

**PLOVDIV.** Post la 34-a kongreso de nia Asocio, la estraro de „Kulturo” decidis stabiligi la societaron. La membraro estis dividita en 18 grupojn. Por ĉiu grupo estis elektita respondeculo, kies tasko estas kolektadi membrakotizon, varbi abonantojn k. t. p. Por la 1961 jaro estas kolektitaj pli ol 100 abonoj por „Bulgara Esperantisto”, „Paco”, „El popola Ĉinio”, „Vietnamio antaŭenmarŝas” kaj „Pola Esperantisto”.

Depost septembro 1960 en la kunvenejo regule okazas renkontoj de la geesperantistoj, kie oni prelegas pri diversaj temoj. Ĉiuvendrede estas aranĝataj konversaciaj vesperoj kun varia kaj tre interesa programo.

Dum oktobro oni malfermis kvar kursojn. Unu el ili estas gvidata de k-do At. Pavlov en la societa klubejo kun 36 gekursanoj. La dua kurso funkcias en la Supera Medicina Instituto kun 30 partoprenantoj. Kursgvidanto estas Lilia Sotirova. La tria kurso funkcias en la Urba Komitato de la Komunista Partio. Gvidas la kurson k-do Iv. Batakļiev. En la centra poŝtejo d-ro M. Ogarov gvidas kurson por poŝt oficistoj. Baldaŭ oni malfermos kursojn en fabriko „Marica”, en la stacidomo kaj aliloke.

**Iv. Batakļiev**

## EKSKURSO AL HUNGARIO

Ankoraŭ de mia infaneco mi ĉiam revis viziti iun fremdan landon, sed mi ne sciis kiam mi povus plenumi tion. La ebleco tamen aperis subite. En nia oficejo estis organizitaj kursoj de Esperanto. Mi ankaŭ partoprenis. Evidentiĝis ke ni baldaŭ veturos al Hungario

Unue ni traveturis Rumanion. En la stacidomo de Bukureŝto nin atendis grupo da rumanaĝesamideanoj. Ili montris al ni la belecojn de sia ĉefurbo. La sekvantan tagon ni daŭrigis la vojon al la celo. Vespere ni alvenis la urbon Bekeŝĉoba — Hungario. Niaj geamikoj el urbo Gjula atendis nin ĉe la stacidomo kaj poste kune kun ni vojaĝis al sia urbo.

La hungaraĝesamideanoj bone gastigis nin dum kelkaj tagoj. Ili organizis kelkajn renkontigojn en diversaj oficejoj kaj entreprenoj. Poste ni havis eblecon ĝui la belecojn de Budapeŝto kaj de la hungara „maro” — la lago Balaton.

Kontentaj de la vojaĝo ni revenis en Sofio por rakonti al niaj geamikoj pri la sukcesoj de la hungara popolo en la konstruado de la socialismo.

**T. Rajnova**  
poŝtistino



**Bulgaraj poŝt oficistoj — esperantistoj dum sia vizito en Hungario**

## NI FUNEBRAS

La 13-a de novembro 1960 forpasis k-do Todor Gceev Veliev — sekretario de la Esperanto-societo „Flamo“ de la Kemla fabriko en Dimitrovgrad. Li estis unu el la plej agemaj esperantistoj en la regiono.

Lia morto estas granda perdo por nia movado en Dimitrovgrad.

## b) EKSTERLANDA

En Moskvo la esperantistoj kunvenas ĉiumerkrede kaj dimanĉe de la 7-a ĝis la 10-a horo vespere en la Domo de Medicinistoj, ul. Hercena 19. Traveturantaj geesperantistoj estas petataj viziti la kunvenojn.

En urbo Tallinn, la ĉefurbo de Estonio, funkcias du kursoj por progresintoj, gvidataj de k-doj Pili kaj Siltam. Funkcias ankaŭ lingva rondo, kiun ĉefe partoprenas kursgvidantoj.

En urbo Erevan, la ĉefurbo de Armena SSR, k-do Mirtĉjan gvidas en la aŭtuno 3 Esperanto-kursojn en 2 lernejoj. Baldaŭ ekfunkcios la 4-a kurso por gelernantoj.

En urbo Tartu, Estona SSR, k-do R. Habvere malfermis Esperanto-kurson en la Medicina Mezlernejo kun 34 gelernantoj ĉi estas lia 25-a postmilita Esperanto-kurso.

Tre vigla kaj fruktodona agado montras la Esperanto-rondo de la Kulturdomo de la latva urbo Liepaja. Dum la aŭtuno la rondo aranĝis samtempe tri ekspoziciojn pri Esperanto: en la urba kulturdomo, en la scienca biblioteko kaj en la montrogestro de la centra librovendado. Estis ekspoziciitaj libroj, revuoj kaj gazetoj, vortaroj kaj lernolibroj, leteroj, bildkartoj kaj aliaj. La ekspozicio vekis tre grandan intereson. Pri la ekspozicioj

STARA ZAGORA. Grava sukceso por nia societo estas, ke en II-a mezlernejo „Geo Milev“ laŭ decido de la direktoro kaj gepatro-instruista komitato, unu tuta klaso (VI b) komencis, lerni Esperanton po unu horon semajne. Kune kun la gelernantoj lernas ankaŭ la vicdirektoro de la lernejo. En la sama lernejo funkcias kurso por 22 gelernantoj el la deka klaso. Instruas I. Markova.

Irina Ĉukova

skribis dufoje sufiĉe detale la loka ĵurnalo „Komunisto“ de 7 kaj 9 de oktobro 1960. En septembro okazis dufoje disaŭdigoj pere de Radio Liepaja pri la agado de la rondo kaj samtempe ni anoncis ankaŭ la okazontajn Esperanto-kursojn. La 6-an de oktobro ekfunkciis de la Kulturdomo du Esperanto-kursoj, gvidataj de k-inoj Lidia Lange kaj Vilma Skalde. La rondo aperigas murgazeton „La Verita Stelo“. Antaŭnelonge la loka ĵurnalo „Komunisto“ aperigis sub titolo „La paco venkas“ leteron de japana esperantisto.

☆

Mi havis la feliĉon partopreni la 2-an junularan Esperanto-tandaron en Kääriku, Estonio. Unuan fojon en mia vivo mi vidis tiom grandan sinceron, kiu regis tie inter diversnaciaj. Dum la tutaj dek tagoj okazis nenio, kio povis iun ĉagreni. Ni bone ripozis sur la bela lagordo. Sed ni ne nur ripozis, ni ankaŭ laboris por Esperanto.

Ni pretigis Esperanto-standardon, murgazeton kaj Esperanto-ekspozicion. Matene ni gimnastikis kaj banis nin. Ni kunvenadis por aŭskulti interesajn lekciojn pri Esperanto.

D. Kaspeoviĉa  
lernantino

## NI RECENZAS

### PRO UNU BOVINO \*

Nia tradukita belarta literaturo pliriĉiĝis per nova kaj plaĉa volumo de vietnamaj noveloj. Per ĉi tiu libro „Vietnama Pacdeenda Esperantista Asocio“ faras bonan surprizon al la esperantistoj en la tuta mondo, konigante al ili legindajn paĝojn pri la naci-liberigaj bataloj.

\* „Pro unu bovino“, elektitaj rakontoj pri la militezistado en Vietnamio pri ĝi 265, tradukis 1 geesperantistoj de la Esperanto — klubo en Hanojo, Vietnamio, 1960

De 1862 ĝis 1884 la francaj imperiistoj invadis la landon kaj subigis ĝian laborantan popolon. Vietnamio transformiĝis en rizejon kaj iom poste en kaŭĉukan plantejon de la Franca Imperio. La ekonomia evoluo de la lando estis direktita al havigo de krudmaterialoj por la francaj monopoloj. Ĉiuj formoj de la kultura vivo estis sufokataj de la koloniistoj.

Dum la Dua Mondmilito la franca administracio humile transiris en servon de la japanaj invadantoj. En aŭgusto 1945, la vietnama popolo per armilo en la manoj renversis la koloniismon kaj liberiĝis. Poste la franca imperiismo perfidis al la subskribitaj kontraktoj. Komenciĝis la dua milito de la francaj imperiistoj kontraŭ la Vietnamia Demokrata



Respubliko. La Ĝeneva Konferenco (1954) helpis pri restarigo de la paco, sed la lando restis dividita en du partojn.

En Norda Vietnamio la liberigita popolo iom post iom transformis sian tutan ekonomion sur socialismaj reloj kaj rapide ĝin disvolvas. Al la konsiderindaj sociopolitikaj kaj ekonomiaj sukcesoj bone korespondas la nova socialisma kulturo. La recenzata libro estas unu el ties modestaj atingiĝoj. Kune kun la eminentaj majstroj de la rakonto, partoprenas ankaŭ novuloj en la verkado. Tamen ankaŭ la rakontoj de la komencantaj aŭtoroj streĉas la atenton de la leganto, ĉar ili fundamente konas la vivon, la batalojn kaj la aspirojn de sia popolo. Ili ĉiuj kun pafilo en la manoj partoprenis en la vicoj de la Liberiga Armeo.

La novelaro kiel tuto prezentas kompletan bildon de la iama Vietnamio. Kune kun la herooj de la rakontoj ni krosas tra la tuta lando. Jen ni vidas la evoluon de la ministriko en karbominaj de Hondajo, ni observas la sangoverŝajn batalojn inter la Liberiga Armeo kaj la francaj kolonistoj, ni ĉeestas la

rabadon kaj konfiskon de la vilaĝana brutaro fare de la okupanta armeo („Pro unu Bovino“). Ni vidas ankaŭ la partoprenon de la montaraj vilaĝoj kontraŭ la francaj sklavigantoj. La okupantoj mortigas senkulpaĵn homojn kaj forbruligas vilaĝojn...

Oni eksentas la grandan moralan forton de la Liberiga Armeo. Per siaj bonfaroj ĝi gajnas la korojn de la ordinaraĵoj („La medaliono de Sankta Virgino“). Ĝi estas malbone armita, neregule provizata, sed pro subteno fare de la popolo ĝi venkas. La armeo de la kolonistoj havas la moralon de tagmeza rabisto. Ĝi estas moderne ekipita kaj havas reton da kazernoj garnizonaj kun lilioj de soldataj postenoj de ĉiu grava vojkruciĝo, sed ĝi havis ankaŭ la malamon de tuta popolo. Nur malmultnombra grupo da perfiduloj al sia popolo kunlaboris kun la kolonistoj.

La libro estas legata dum unu spiro. Ni atendas novajn librojn pri la nuntempa socialisma konstruado en la Vietnamia Demokrata Respubliko.

Canko Murgin

## ORGANIZA KONKURADO 1961—1962

Rezulte de la organiza konkurado dum 1959 la societo en v. Pordim, distr. de Pleven, ricevis la transiran flagon de CK de BEA. Malgraŭ iuj mankoj en la organizo de la konkurado ĝi havis pozitivan rezulton. CK de BEA iniciatas novan konkuradon por la jaroj 1961—1962 (ĝis la 35-a kongreso).

La kondiĉoj de la konkurado estas jenaj:

1. En la konkurado partoprenas ĉiuj societoj, kiuj ekzistis je la 1-a de januaro 1961.

2. La konkurado okazas pri la kvanto de regulaj asociaj membroj kaj pri la abonantoj de „Bulgara Esperantisto“.

3. Kiel bazon por plimultigo de la membraro kaj de la abonantoj ni akceptas la kontrolajn ciferojn publikigi ajn ĉi sube.

4. La komparo de la rezultoj estas bazita sur procenta plenumo de la kontrolaj ciferoj. Estas konsiderata la meza procento por membroj kaj abonantoj.

5. La rezultoj estas kalkulotaj po duonjaroj. La membrokotizon la societoj pagos al la asocio ĝis la deka tago de la lasta monato de ĉiu trimonato (marto, junio, septembro kaj decembro). Informojn pri la marŝo de la konkurado ni publikigos en la julia kaj decembra numeroj de la kuranta jaro en „Bulgara Esperantisto“ kaj en julia numero de 1962.

6. La fina dato de la konkurado estas la 10-a de majo 1962, kiam la societoj devas pagi la membrokotizon almenaŭ por la unua duono de 1962.

7. La plano por plenumo dum 1962 estas per 10 procentoj pli alta ol tiu dum 1961.

8. La fina rezulto egalas al la meza procento de la tri duonjaroj.

9. Nun ni publikigas la societojn laŭ la alfabeto ordo, poste — laŭ la grado de la plenumo.

10. Premioj: unua — la transira flago de CK de BEA kaj biblioteko por 300 levoj; dua — biblioteko por 250 levoj; tria — biblioteko por 200 lv.

La unuaj dek societoj ricevos honorcertigon de CK de BEA.

	Societoj	Kontrolaj ciferoj 1961			Societoj	Kontrolaj ciferoj 1961	
		mem-broj	abonantoj			mem-broj	abonantoj
1.	Asenovgrad — „D. Sasovov“	80	55	40.	Ispertih — „Stelo de Ludogorie“	20	15
2.	Bankja (Sof.) — „Solidareco“	25	17	41.	Jambol — „M. Gorkij“	55	35
3.	Bansko — „Pirinmontaro“	20	15	42.	Kamenovo (Sliv.) — „Zagora esperantisto“	16	10
4.	Batak „Petr Toškov“	16	10	43.	Kargali — „Stelo“	30	20
5.	Batoševo (Gab.) — „Amikeco“	16	10	44.	Kazanlak — „Roza valo“	20	70
6.	Beglej (Plev.) — „Aŭroro“	16	10	45.	Kjustendil — „Flamo“	40	30
7.	Belogradčik — „Eho de la Rokoj“	16	10	46.	Klisura	16	10
8.	Belozem (Plov.)	16	10	47.	Kneja — „Agro“	16	10
9.	Berkovica	25	17	48.	Kolarovgrad — „Vekiĝo“	80	60
10.	Bjala — „Paco“	25	17	49.	Kričim	16	10
11.	Blagoevgrad — „Espero“	40	30	50.	Kubrat — „Progreso“	50	35
12.	Brdan (Plov.) — „Fajrero“	16	10	51.	Lehčevo — „Pacdefendanto“	16	10
13.	Borima (Loveč) — „Nova Mondo“	70	50	52.	Levski — „Trumpetisto“	25	17
14.	Borovo (Ruse) — „Lumo“	16	10	53.	Levski — „Verda Radio“	20	15
15.	Botevgrad — „Ĥr. Botev“	20	15	54.	Levskigrad — „V. Levski“	80	60
16.	Bracigovo (Plov.) — „N. Mišev — Kamarado“	16	10	55.	Ljubimec (Ĥas.) — „Ruĝa stelo“	20	15
17.	Breznik — „Aŭroro de Komunismo“	20	15	56.	Loveč — „Espero“	30	20
18.	Buĥovo — (Sof.) — „Komsomola Solidareco“	16	10	57.	Lukovit (Lov.) — „Impeto“	16	10
19.	Burgas — „Nigra maro“	90	65	58.	Madan	16	10
20.	Čirpan — „Mondamikeco“	20	15	59.	Mezdra — „Vapcarov“	25	17
21.	Dalboki (St. Z.) — „Marko Ivanov“	20	15	60.	Mičurin — „Amikeco“	25	17
22.	Dimitrovgrad — „Flamo“	40	30	61.	Maglij — „Septembra ribelo“	20	15
23.	Dimitrovgrad — „Internacia amikeco“	80	55	62.	Mihajlovgrad — „Septembra gloro“	16	10
24.	Dimitrovo „Nova Vojo“	30	20	63.	Nova Zagora — „E. Priva“	20	15
25.	Drjanovo — „Iv. Vladkov“	16	10	64.	Orjaĥovo — „L. L. Zamenhof“	25	17
26.	Dve Mogili (Ruse)	16	10	65.	Panagjurište — „Nova stelo“	16	10
27.	Elĥovo	16	10	66.	Pārvomaĵ — „D-ro Zamenhof“	20	16
28.	Etropole — „Kamaradeco“	16	10	67.	Pazarĝik — „Radio“	80	60
29.	Gabarevo — (St. Zagora) „D-ro Zamenhof“	16	10	68.	Petrič — „Esperanto Triumfonta“	30	20
30.	Gabrovo — „Verda Torto“	90	65	69.	Peštera — „Nova Epoko“	20	15
31.	Goce Delčev — „Pirin“	40	30	70.	Pleven — „Eterna Amikeco“	80	60
32.	Gorna Orjaĥovica — „Espero“	30	20	71.	Plovdiv — „Kulturo“	250	170
33.	Gorna Orjaĥovica — fervojista	20	15	72.	Poljanovgrad — „Mondpaco“	20	15
34.	Gorni Domljan (Plov.) — „Paco“	16	10	73.	Polski Trāmbes — „Progreso“	30	25
35.	Gorno Sahrane (St. Z.) — „G n. Radojnov“	16	10	74.	Pomorle — „Tr. Ĥristovski“	20	15
36.	Govedarci (Sof.) — „Mondpaco“	16	10	75.	Popovo — „Homeco“	20	15
37.	Hagi-Dimitrovo (St. Z.) — „D. Iv. Tribunčika“	16	10	76.	Pordim — „Juna Esperantisto“	35	25
38.	Harmanli — „Progreso“	16	10	77.	Preslav	16	10
39.	Ĥaskovo — „Asen Zlatarov“	40	30	78.	Prolom (Plov.) — „Prin-tempo“	16	10
				79.	Radanovo (Tārn.) — „Aŭroro“	16	10

	Societoj	Kontrolaj ciferoj 1961		Societoj	Kontrolaj ciferoj 1961		
		mem- broj	abo- nantoj		mem- broj	abo- nantoj	
80.	Rajkovo (Smol.) . . . . .	16	10	103.	Ŝipka (St. Z.) — „Ŝipka“	16	10
81.	Raĵevo Konare (Plov.) . .	16	10	104.	Ŝtraklevo (Ruse) — „Pac- batalanto“ . . . . .	16	10
82.	Razgrad — „L. L. Zamen- hof“ . . . . .	25	17	105.	Taja (St. Z.) — „Ruĝa stelo“ . . . . .	16	10
83.	Rozino — „Stelo de l'Paco“	30	20	106.	Targoviŝte — „Verda Es- kadrono“ . . . . .	25	17
84.	Ruse — „Dimitrovec“ . .	35	25	107.	Tárnovo — „Lumo“ . . . .	75	50
85.	Ruse — „Libero“ . . . . .	80	55	108.	Teteven . . . . .	16	10
86.	Ruse — „Pontodel'Amikeco“	30	20	109.	Tolbuĥin — „Paco“ . . . .	40	25
87.	Samokov — „Rila Esperan- tisto“ . . . . .	30	20	110.	Trjavna — „Verda Stan- dardo“ . . . . .	20	15
88.	Sevlievo — „Fratiga Stelo“	45	30	111.	Trojan — „Balkana Stelo“	35	25
89.	Silistra . . . . .	18	10	112.	Trojanovo (St. Z.) — „Es- pero“ . . . . .	16	10
90.	Sliven — „Espero“ . . . .	35	25	113.	Trud (Plov.) — „Paco“ . .	16	10
91.	Smoljan . . . . .	16	10	114.	Uzungovo (Has.) — „Ruĝa & Aŭroro“ . . . . .	16	10
92.	Sozopol . . . . .	20	16	115.	Varna — „Albatro“ . . . .	250	170
93.	Sofio — fervojista . . . .	150	100	116.	Vazovgrad — „Pacbata- lanto“ . . . . .	25	17
94.	Sofio — „Heroldo“ (poŝ- tistoj) . . . . .	40	25	117.	Velingrad — „Stojo Kal- pazanov“ . . . . .	30	20
95.	Sofio — „M. Gorkij“ . . .	400	280	118.	Vetren (St. Z.) . . . . .	16	10
96.	Sofio — „Printempo“ . . .	35	25	119.	Vidin — „Espero“ . . . . .	25	17
97.	Sofio — „Vela Peeva“ . . .	30	20	120.	Vladimirovo (Miĥ.) . . . .	16	10
98.	Stanke Dimitrov — „Ma- rek“ . . . . .	55	35	121.	Vraca — „Sukceso“ . . . .	70	40
99.	Stara Zagora — „Verda stelo“ . . . . .	55	35	122.	Zimnica (Jam.) . . . . .	16	10
100.	Sveŝtare (St. Z.) . . . . .	16	10				
101.	Svilengrad — „Nova Mon- do“ . . . . .	20	15				
102.	Sviŝtov — „Danuba stelo“	25	17				

**Rimarkigo:**

La societaj estraroj devas tuj pridiskuti la kontrolajn ciferojn kaj organizi ilian plenumon Skribu al CK kaj al la redakcio pri la entreprenitaj laboroj tiurilate.

**REDAKTA KOMITATO**

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV,  
Kiril DRAJEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV

Korektis : D. Ĉolakova

Formato 71/100/16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso : Bul. Dondukov 57, Sofia, Tel. 7-46-01, Ĉek-konto 15/1052

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofia

Ĵus aperis

# ELEKTITAJ VERSAĴOJ

de NIKOLA VAPCAROV

kun antaŭparolo de ĤRISTO RADEVSKI  
sub la redakto de ATANAS LAKOV

Luksa papero, broŝurita, paĝoj 72

Aĉetebla ĉe la librejoj de la Bulg. Esp. Kooperativo  
en Sofio kaj ĉe la librejoj de „Peĉatni proizvedenija“ en la pli  
grandaj urboj de la lando

La libro estas la plej konvena donaco  
por via eksterlanda korespondanto

Prezo 6.70 lv.

## BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

p. k. 66 — Sofia

liveras:

Malnovajn ekzemplerojn de „Bulgara esperantisto“

1958 jaro — 1—10 numero × 1 lv. rabato 50%

1959 „ — 2—12 „ × 1 lv. „ 40%

1960 „ — 1—12 „ × 1 lv. — —

Portreto „Zamenhof“ . . . . × 1 lv.

Ĵurnalo „Esperanto“ . . . . × 0.20 lv. rabato 50%

Jubilea ĵurn. „Zamenhof“ . . × 0.40 lv. „ 50%

„La lernejo kaj Esperanto“ . × 1 lv. „ 40%

„Amika Vietnamio“ . . . . × 7 lv. — —

„Sub la jugo“ — lv. Vazov . × 17.30 lv.

— Gekamaradoj faru viajn mendojn kolektive pere de la societoj

